



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 2-a de Oktobro 2017

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Asaf Ĥefec, Dror Gaon, Gabi Zeevi.
Telefona kontakto: Amri Wandel, Eran Vodevoz. **Gastoj:** Lea, Joela, Mikaelo

Protokolo de la antaŭa kunsido (4-a de Septembro 2017) – dissendita al la estraranoj.

La Estraro esprimas siajn sincerajn kondolencojn pro la forpaso de nia amiko, ELI-ano, Miĥaelo Giŝpling.

L Estraro esprimas siajn bondezirojn al nia estrarano, Matilda Landaŭ, kaj deziras al ŝi rapidan resaniĝon kaj bonfarton.

La Estraro dankas al Joela pro ŝiaj penoj trovi lokon por la kurso en Tel-Avivo.

1. Raportoj:

- a) **Transportado** de la postlasaĵoj de Aleks Kerbel al Jinon Meiri (Jehoŝua). Estis 4 kestoj, la familianoj helpis paki, la taksio kostis 250 siklojn.
- b) **Pago** de ripar-elspezoj al la luantoj de la Dratwerejo: 770 NIS por dom-riparo. (Ŝlomo jam pagis ĝin).
- c) **La Jerusalema Grupo** renkontiĝos merkrede, la 25/an de oktobro, en la Ortodoksa Centro.
- ĉ) **Reklamo:** Amri kunlaboras kun UEA (Renato Corsetti kaj Emilio Sid) pri la Facebook-kampanjo, por reklami E-on en Jordanio.
- d) **Giŝpling:** Amri rezervis nekrologon en RE pri Mikaelo – 150 vortoj, ĝis la 5-a de oktobro. Jehoŝua verkos.
- e) **Vizitoj** de eminentuloj en la klubo (Amri)
 - i- Ans Bakker vizitos la klubon la 16-an de oktobro kun sia filo Mark. Akompanos ilin Moŝe Ben Porat (Amri estos ankoraŭ eksterlande). **Propono:** elekti ŝin tiuokaze kiel Honora Membro de ELI! Ŝi ĉiam apogis nian asocion, spirite en diversaj forumoj, kaj efektive per malavaraĵ mondonacoj. (Lastatempe ŝi donacis al ELI 740 eŭrojn: 500 por jordanian reklam-kampanjo, kaj 240 por la Jerusalema Grupo). *Voĉdono: unuanime aprobita!*
 - ii- Zaki Ŝif vizitos, kaj tiuokaze li prezentos sian videofilmon pri Zamenhof. Li ricevis tiucelesubvencion de 2000 eŭroj de fondaĵo Hodler. Amri verkis tiutempe la subvencio-proponon, kaj Ans Bakker, prezidantino de la fondaĵo subtenis la decidon.
 - iii- La 23-an de oktobro prelegos en la klubo pri Koreio So Gilsu, korea emerita profesoro, iama estrarano de UEA. Akompanos lin Amri.
 - iv- La 22-an de oktobro Amri ĉiĉeronos Ans, So Gilsu kaj lian edzinon al la Morta Maro kaj Jeriko.
 - v- Ans kaj ŝia filino Ĥaja venos viziti la Jerusaleman Grupon.

2/...



2. Esperanto kurso en Tel Avivo

- a) **La reklam-komisiono:** Eran trovis interesiĝantojn pri E-kurso en Givatajim, kaj sekve demisiis de la reklamkomisiono. Anstataŭanto ne estis trovita.
- b) **Salono:** Joela tre multe klopodis en ĉiu direkto. Finfine ŝi trovis: “Komuna Centro por maljunaj civitanoj je la nomo de Beni kaj Lotti Reich”, Arlozorov str. 106, Tel Aviv. Ili donos la ejon po ĵaŭdo inter 5-7 pm, por 200 NIS por ĉiu renkontiĝo x 20 okazoj = 4000 NIS. (Doron akceptis la lokon kaj la tempon). *Voĉdono: unuanime akceptita!*

Posta evoluo: la konstato kvazaŭ Doron akceptis, montriĝis neĝusta. Kvankam al Joela li ŝajne diris ke la ejo en Arlozorov estas enorde, fine evidentiĝis ke li fakte ne povas en tiu tago, kaj cetere kontraŭas la elspezon de 4000 NIS. Sekve necesis repreni la decidon. Retaj kaj telefonaj konsultiĝoj montris ke la plej bona solvo estos en la klubejo en WIZO, post la (mallongigita) klubvespero. Interkonsente kun Doron estis akceptitaj la horoj 19:40-21:00. Nesecos formale voĉdoni en la venonta kunsido. Amri informis pri la ŝanĝo al Joela, kiu ankoraŭ ne interparolis kun la loko en Arlozorov.

- c) **Lea:** La elspezoj por unu kurso - 18000 sikloj por eble 6 gelernantoj estas **troigita!** Ni devas pripensi ankaŭ **aliajn eblecojn**, inkluzive privatajn lecionojn por la interesantoj, se ilia malkreskanta nombro tion postulos.

Posta pliĝustigo: la sumo 18,000 NIS estis erara. Efektive temus pri maksimume 16,000 (ĝis 5000 reklamo + 7000 por Doron + 4000 por la salono), kaj sekve de la rezigno pri Arlozorov kaj reiro al WIZO kostos maksimume 12,000. El tio minimume 2400 (6x400) kovros la kurskotizoj.

3. Dratwerejo (Eran - telefone)

Ni ricevis la mallongigon de la kontrakto kun la entreprenisto. Li estos petata daŭrigi la diskuton kun ilia advokato, ĝis la fina subskribo fare de ni. Eran> proponas oferti al li por tio 3000 siklojn. *Voĉdono: aprobita!* Antaŭ la konstruado la luntoj devos foriri, kaj dum la konstruado la entreprenisto daŭre pagos al ni la lupagon (*kontroli en la kontrakto!*).

4. Financoj (Ŝlomo)

- a) Monprunto por nia oficejo: Fine iu bank-filio emas paroli kun ni pri prunto al ni, kiel asocio - Bank Tfaĥot, Dizengoff Center. Ŝlomo iros paroli, Jehoŝua akompanos lin.
- b) Duonjara financa raporto kun detaloj: disdonita al ĉiu estrarano, pridiskutita, *aprobita*.

La venonta kunsido: lunde, la 6-an de Novembro 2017, je 19:45

Protokolis: Gabi Zeevi